

Juna amiko

INTERNACIA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

Aprilo, n-ro 89/2 (49), 16a jaro



Lernantoj tra la mondo

Trovu ekde paĝo dek naŭ vian gvidilon
tra la mondo de Esperantaj lernejoj



Juna amiko, revuo por lernejanoj kaj komencantoj. Eldonata de la Hungara Esperanto - Asocio kaj aŭspiciata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Aperas kvarfoje jare: februare, aprile, septembro kaj novembro.

Redaktoro kaj grafiko: Stefan MacGill.

Adreso de la redakcio: pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario.

Abonprezo en Hungario ĉe HELIR: 40 ft. (por eksterlandano 48 ft.) Internacie ĉe UEA: 8,40 gld.

Anoncoj:

Kvaronpaĝo: 250ft soclande aŭ 25gld aŭ 3 jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 420ft aŭ 42gld. aŭ 5 jarabonoj.

Tuta paĝo: 600ft. aŭ 60 gld. aŭ 7 jarabonoj.

La junaj vizaĝoj, kiuj rigardas vin sur nia kovrilpaĝo, fakte rigardas vin el la pasinteco. De ili al vi estas salto ne nur de tridek centimetroj, sed ankaŭ de dek du jaroj. Tiuj lernejanoj estis fotitaj de via redaktoro en 1977 en belga vilaĝo St. Gerard, apud Namuro. Tie okazis en junio internacia renkontiĝo por lernantoj de Esperanto.

Pli ol ducent geknaboj el Belgio, Nederlando, Francio, FR Germanio kaj Jugoslavio kunvenis en la vilaĝa lernejo kaj dum semajno kune studis, ludis, manĝis, sportis, ekskursis, vivis ... kaj interkompreniĝis per Esperanto. Tio estis la kulmino de kvinlanda eksperimento organizita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Tiuj partoprenintoj estas nun, kompreneble, pli ol dudek jaraĵoj. Multaj el ili estas jam edzoj aŭ edzinoj, aliaj diplomigaĵoj en universitatoj, aliaj jam laboras. Kiom el ili ankoraŭ parolas aŭ uzas Esperanton? Ni ne scias.

Ne plu okazas tiaj eksperimentoj kaj grandaj komunaj renkontiĝoj. Foje klasoj korespondas, eĉ vizitas unu la alian. *Juna amiko* volas helpi vin intensigi tiujn kontaktojn, ĉar nur se vi, la lernantoj, trovos praktikan utilon en la lingvo, vi emos ĝin plustudi kaj uzi post la fino de viaj lernejaj kursoj. Sur la paĝo dek naŭ, jen por vi kontaktilo.

Nia kutima rubriko 'Deziras

korespondi', pro la abundo da materialo ĉi-numere, apenaŭ sukcesis resti en la revuo. Ĉio alia provas forpuŝi ĝin, sed ĝi brave tenas sin per la ungoj kaj rifuzas forfali. Ĝi do aperas ĉi-foje sur la dorsa kovrilo. Uzu ambaŭ kontaktilojn!



Stefan

Stefan MacGill,
18a de marto, 1989.

Nemzetközi eszperantó diáknap. Megjelenik évenként egyszer. Ára: 10 ft. 89/2 szám, XVI évfolyam. Felelős szerk.: Schiller Judit. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség, Szentháromság tér 6, H-1014 Budapest. Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a MESZ Soksorozósítóban; heuróta 89-059. Klad. eng. szám: III/IFJ/30/1978; ISSN 0230-1318.

Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkiízübesítő postahivatalnál, a hírlapkiízübesítőknél, a Posta hírlapüzletiben és Lapellátási Irodánál (HELIR), Budapest, XIII, Lehel u. 10/a, 1900 - közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a HELIR 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra.

LETERO DE LERNEJANOJ:



Wasilków,
la 27-an de oktobro 1988

Saluton!

En Pollando estas aŭtuno. Tagoj fariĝas pli mallongaj kaj noktoj pli longaj. Pli malforte brilas la suno. Estas jam eĉ frosto.

En nia lernejo lingvon Esperanto lernas ĉiuj infanoj el sep klasoj. Estas ankaŭ Esperanto-rondo. Ĝi konsistas el du apartaj grupoj. En nia grupo estas kvin gelernantoj. Ni lernas jam la kvinan jaron. Ni renkontiĝas unufoje en la semajno. Ankaŭ unufoje en semajno renkontiĝas dek unu gelernantoj el la 4a kaj 5a klasoj.

En septembro en nia lernejo estis esperantisto el Pakistano. En oktobro nia grupo gastigis du esperantistojn el Litovio. Ili vizitis Pollandon kaj estis ĉefe en Wasilków. En nia lernejo okazas plebiscito (speco de voĉdonado) pri la nomo de la patrono de la lernejo. Unu el la kandidatoj estas Ludoviko Zamenhof.

Tiom de ni.

Kore salutas vin.

E-rondo el Wasilków.

Jen bela letero de la klubanoj en la lernejo de Wasilków, kiu estas pitoreska urbeto en nord-orienta Pollando, ĉirkaŭ 15 km. for de Białystok, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. Kiel informas la letero, multaj Esperantaj klasoj okazas en tiu lernejo, pluraj el ili oficialaj. Pli da detaloj pri ili, kaj de aliaj lernejoj tra la mondo, estas troveblaj fine de nia revuo ĉi-foje. Jes, ni scias, ke la rezultoj de nia enketo impresas iom statistike, iom seke kaj seninterese; sed memoru, ke malantaŭ tiu amaso da faktoj, vi trovos vivantajn, aktivajn lernantojn, ĉiuj kun interesaĵoj por rakonti al vi.



ĴUS SAVITAJ ŜIPARISTOJ
SOP MALPROKSIMA INSULO
TRE ATENDAS HELPANTON.




IUĜE ILI VIDAS ŜIPON
KAJ RAPIDE SKRIBAS
LETERON KUN PETO PRI HELPO.


HELPPRETA, FIŜKAPTANTA KNABO
VOLAS HELPI PER SIA ŜIPETO.





GRANDA MIRADO...



Laŭ nia invito en antaŭa numero, ni ricevis du belajn bild-rakontojn pri maristoj kaj insulo. Ili venas de la fratoj Kuse el Schwerin en GDR, kiuj kaj verkis la rakonton kaj desegnis la bildojn. Ĉi-numero ni aperigas la rakonton de 12-jara Frauke, en nia venonta numero vi ĝuos tiun de Franze, kiu estas 8-jara. Ni kore dankas, gratulas, kaj sendas al ili libro-premiojn pro la laboro kaj lerto.



... KAJ EKBAĤALO PRI LA ŜIPETO DE LA KNABO
ĜIS ĜI KRESKAS EĈ AL ŜIPEGO...



UNU KISAS-LA ALIAN KAJ FELIĈE ILI VETURAS HEJMEN.



FREŜA MATENO

Ĉiu freŝa maten'
Kiel roset' sur flor'
Delikata, ho jen
En ĝi belas l'auror'

Rule falas ĝi tuj
Je tremeta svarmo
Vaporigōs ĝi tuj
En la suna varmo

Verda Maro, Ĉinio.

Kanto-kasedo Dinnyés: AL VENKO!

16 esperant-lingvaj kantoj de la fama gitaristo-kantisto József Dinnyés (prononcu *Joĵef Dinjeŝ*). Krom liaj kantoj vi povas ĝui ankaŭ melodiigitajn verkojn de famaj Esperantaj aŭtoroj, kiel R. Schwartz, J. Baghy, L. Zamenhof kaj aliaj. Bonkvalita registraĵo, bela aspekto. Por aĉeti la kasedon, turnu vin al via Libroservo. Eldonis:

LINGVO-Studio, Budapeŝto

Konkursaj rezultoj


En numero 88/4 ni aperigis krucvortenigman konkurson. Ni ricevis nur dek du respondojn (SU 4, GDR 3, H 2, BG 1, YU 1, PL 1). La kaŝfrazo estis 'Kiu parto estas plej inda?' En la enigmo troviĝis tri direktoj: norde, sude kaj oriente. Mankis 'okcidente'. Gajnis libropremion Carola Lehr el Neubrandenburg, GDR kaj 13-jara Hardi Hõimoja el Tallinn, SU.

En la sama numero estis pli defia konkurso pri la pordoj kaj la princino. Venis nur kvin respondoj, el kiuj kvar taŭgis. lumaniere necesas igi la mensogantan gardiston devi double mensogi, tiel ke li, same kiel la alia gardisto, devas ĉiam diri la veron. Demandoj kiel 'Se mi demandus la alian gardiston, kion li respondus?' aŭ 'Se mi estus demandinta vin antaŭ minuto, kion vi estus respondinta' taŭgas. Libropremion ricevas Frauke Kuse, 12-jara, el Schwerin, GDR. Dankon al la partoprenintoj!

Nova konkurso

Respondu la sekvan demandon per minimume 100 kaj maksimume 200 vortoj. Vi rajtas aldoni desegnaĵojn. Limdato: 15a de junio 1989. Indiku vian aĝon, unu premio estos por malpli ol 15-jaruloj, alia por ĉiu. Sendu viajn respondojn al Juna amiko, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario. Vi estas lokomotivestro.

Jen via stacidomo. Vi devas interŝanĝi la lokon de vagonoj A kaj B kaj revenigi vian lokomotivon al ĝia komenca pozicio. Kiel fari tion per la minimuma nombro de movoj? La lokomotivo ne rajtas forlasi la trakojn kaj vi ne rajtas alkonstrui pliajn trakojn!



La maljunulo kaj lia porko

En antaŭaj tempoj ekzistis vilaĝo, kies nomo estis Ulmo. La vilaĝanoj en Ulmo ne estis tro saĝaj. Ili fidis ĉion, kion ili aŭdis. Ili kredis, ke eblas fali de sur la tero, se oni sukcesus atingi ĝian randon.

La plej saĝa en Ulmo estis maljunulo, havanta porkon, kiun li tre amis. Kaj eĉ kiam li estis devigata ien forveturi, li kunprenadis la pordon de sia domo, por ke rabistoj ne invadu la domon kaj ŝteli lian porkon. Unu tagon, kiam li estis portanta sian pordon sur la dorso, li renkontis maljunan virinon. "Kial vi portas ĉi tiun pordon sur la dorso?" demandis la maljunulino.

"Por ke rabistoj ne povu invadi mian domon kaj ŝteli mian malgrandan porkon." respondis la saĝa maljunulo.

"Nu, en mia domo estas neniam valoraĵoj," diris la maljunulino: "sed mi havas bonegan legomĝardenon. Mi tuj reiru kaj prenu ties pordeton, tiel ke neniu povos enveni la ĝardenon kaj preni miajn terpomojn." Do, la maljuna virino ekiris reen, prenis tiun pordeton kaj metis ĝin sur la ŝultrojn.

Poste, la saĝa maljunulo renkontis junan farmiston, kiu diris: "Kial vi portas tiun pordon sur la dorso, maljunulo?"



"Ho, por ke rabistoj ne invadu mian domon kaj ne ŝtelu mian malgrandan porkon."

"Bone," diris la farmisto: "Mi ofte angoras, ke iu, preterirante mian lage-ton, timigos mian anasaron. Mi eĉ faris grandan barilon ĉirkaŭ la lageton, sed nun mi komprenas, ke tio ne sufiĉas. Mi tuj revenu hejmen, elfosu la barilon kaj kunportu ĝin. Tiel, neniu povos transiri al mia lageton." Do, la juna farmisto iris hejmen, elfosis la barilon, sed la maljunulo plu iris, portante la pordon sur sia dorso. Baldaŭ li renkontis alian virinon.

"Kial vi portas tiom pezan pordon sur la dorso, maljunulo?" ŝi demandis lin.

"Ho, por ke rabistoj ne invadu mian domon kaj ne ŝtelu mian malgrandan porkon."

"Kiom saĝe!" diris la virino, "Nun mi scias, kion necesas fari. Mi aĉetis belegan liton kaj ĉiam timas, ke iu kuŝiĝos sur ĝin en malpura vestaĵo. Mi tuj venu hejmen kaj same prenu mian pordon. Tiel, neniu povos kuŝiĝi sur mian liton." Do, la virino iris hejmen, prenis la pordon kaj ekportis ĝin tra la vilaĝo. Sed la saĝa maljunulo plu iris. Baldaŭ li atingis la celatan lokon kaj poste li ekiris reen al sia hejmo. Veninte hejmen li komencis voki sian porkon. Sed la porko ne reeĥis. "Strange," cerbumis la maljunulo: "ĝin prenis neniu, ĉar neniu povis invadi la domon, ĉar ties pordo forestis. Li rigardis sub ĉiujn seĝojn, sub la tablon kaj la liton, sed nenie li trovis sian porkon. Do, li eliris kaj ekpaŝis suben laŭ la vilaĝa vojo. Baldaŭ li venis al la domo de la maljuna virino: "Ĉu vi vidis mian porkon?" li demandis.

"Ne, mi ne vidis vian porkon. Sed iu estis en mia ĝardeno kaj elfosis ĉiujn el miaj legomoj. Mi ne povas kompreni, kiel tio okazis, ĉar mi kunprenis la pordeton. Ja neniu povis enveni ĉi tien!"

La maljunulo svingis la ŝultron senkomprene kaj ekiris pluen. Poste li renkontis la junan farmiston: "Ĉu vi ne vidis mian porkon?" li demandis.

"Mi ne vidis vian porkon," respondis la farmisto: "sed iu venis al la lageton kaj timigis la tutan anasaron."

La maljunulo nenion diris kaj ekiris pluen. Kiam li iris preter la domo de la juna virino, li ekaŭdis teruran bruon. Li eniris la domon. La juna virino staris apud sia lito plorante: "Mia lito! Mia lito" ŝi kriis, kaj li vidis sian porkon kuŝanta sur la lito!

"Mi ne komprenas," diris la maljunulo: "kiel povis enveni mia porko ĉi tien, se vi kunprenis vian pordon."

"Mi ne scias," ploris la virino: "Ho, kion fari?" La maljunulo cerbumis kaj cerbumis. "Kompreneble", li fine kriis: "mi devis kunpreni mian porkon anstataŭ la pordo."

”Kaj mi,” diris la juna virino: ”devis kunpreni la liton anstataŭ mia pordo.
”Kaj mi devis kunpreni mian anasaron anstataŭ la barilo” diris la farmisto, kiu venis al ili.

”Kaj mi devis kunpreni miajn legomojn anstataŭ la pordeto,” diris la maljuna virino, kiu ĵus venis al ili.


”Jen kiel ni agu ekde nun kaj ĉiam plu,” diris ili ĉiuj. Kaj ili agis tiel, certe. Dum la maljunulo kunportis ĉiam sian porkon, ĝi maldikiĝis, la ĝardeno de la maljuna virino ne plu kreskis, la anasaro de la juna farmisto ne plu kovis kaj la lito de la juna virino iĝis tre malpura, sed kiel la maljunulo tre saĝe diris: ”Tio ne gravas, ĉar niaj aĵoj estas sekurigitaj!” Kaj la vilaĝanoj de Ulmo konsentis, ke li estas prava, kaj certe, tre tre saĝa!

*Tradukis el la angla
Peter Savolainen
Mahaikala, Sovet-unio*

Inverse esrevni

La ŝuisto prenas ledon.
Faras belan dekstran ŝuon.
Metas mi la dekstran ŝuon
Sur maldekstran la piedon.
Prenas la ŝuisto ledon,
Faras tuj maldekstran ŝuon.
Metas mi la duan ŝuon
Dekstre tuj sur la piedon.
La piedoj, ve! doloras.
Se mi marŝas sur la padoj,
Mokas min la kamaradoj.
Pro doloroj mi esploras.
Plori taŭgas ne por bubo.
Mi nun metas ekde tiam
Dekstran ŝuoln dekstren ĉiam.
Venis suno el la nuboj.

*Rikardo Ŝulco,
Mindeno; FR Germanio*



Leteroj kaj alvokoj

Danke al renovigoj en nia respubliko ŝanĝiĝas la konsideroj pri Esperanto. Ekde oktobro 1988 la porlernejana revuo 'Moksleivis' aperigas rubrikon 'Esperanto' kun lecionoj kaj pri-esperantaj artikoloj. En ĝia rubriko 'Deziras korespondi' estas bonvenaj adresoj de korespondemuloj en Esperanto el la tuta mondo. Kiu deziras korespondi kun junaj litovaj esperantistoj skribu al: 'Moksleivis', Esperanto, Komunaru 8/10, MTP-4, SU-232600 Vilnius, Litovio, Sovet-unio.

Rolandas Stramkauskas

Klaipeda Esperanto-Rondo organizas letervesperon en majo. Bv. sendi leterojn al: 'Esperanto', Pionira Domo, SU-235800 Klaipeda, Litovio, Sovet-unio. Ni volonte korespondos, ni estas 11- ĝis 20-jaraj.

Okaze de 'Internacia Tago de Mondpaco' je la 1-a de septembro 1989 la Esperanto-grupo en Dressau organizos letervesperon kaj ekspozicion. Ni atendas E-

ajojn, desegnaĵojn, salutkarton ktp. por demonstri la disvastiĝon de Esperanto. Ĉiu ricevos respondon. S-ro Uwe Heidrich, Augustenstr. 8, DDR-4500 Dressau, Germana DR.

Mi estas instruistino de Esperanto en kulturdomo. Mi instruas 50 infanojn 6-12-jaraj, kiuj estas membroj de ensemblo 'Internacia Infana Teatro de Danco kaj Kanto'. Ni preparis esperantan programon kaj jam elpaŝis en la pola televido. En nia programo troviĝas i.a. versaĵo 'Mia patro' el 'Juna amiko'. Ni deziras vojaĝi eksterlanden kaj prezenti nian programon. Ĉu eksterlande Esperantaj organizaĵoj povos gastigi nin kaj aranĝi eblecojn por prezentadoj? Krome la kursanoj volonte korespondas.

Teresa Jankowska,
ul. Iwicka 40.m.18, PL-00-735 Warszawa.

Vizitantojn bonvenigos la klubanoj 'Ondo'. Ili gvidos vin en ilia urbo, konatigos ĝian malnovan historion, nuntempon kaj E-movadon: Esperanto-klubo 'Ondo', c.a.d. 193, SU-233000 Kaunas, Litovio, Sovet-unio.

'Multan ĝojon havis ni ĉiuj el la kvara numero de 'Juna amiko'. Ni tralegis ĝin de komenco ĝis fino kaj preskaŭ la tutan materialon ni uzos en nia agado. Des pli ĝoje kaj inspire, ke nia E-klubo 'Tondro' el Jonava gajnis premion. Nia klubo ekzistas du jarojn, ni bezonas multon por pli interesa agado kaj nun via revuo treege helpas.'

Laima Krivickieme
a.d. 24, SU-235000 Jonava

PRINTEMPO

**La tagoj estas sunaj
Suno nin varmigas
Verda herbejo
Ĝoje al ni ridas.**

**Hirundo venadas
Vintro foriras
Kampanulo blua sonas
Rivereto murmur-fluas.**

*Ana Petranoviĉ,
Velika Gorica, Jugoslavio.*

La redaktoro kore dankas la lernantojn el la lernejo 'Jonko Kolev' en Gabrovo, Bulgario, pro la donacitaj artaĵoj, neĝflora ŝtofbildo kaj fadena kor-paro. La instruistino skribas: 'Miaj gelernantoj estas 6- ĝis 8-jaraj. Ili tre ŝatas nian kutimon; ĉiujare en la unua tago de la unua printempa monato — la unua de marto — sur la brusto de ĉiuj bulgarioj ekbrilas per sia blanka-ruĝa beleco nia plej bulgara ornamaĵo la 'martenica'. La blanka koloro de la fadeno simbolas longan vivon kaj la ruĝa sanon kaj forton.

Karaj amikoj,

Mi nomiĝas Juan Monés. Mi havas 26 jarojn. Mi loĝas en Havano, la ĉefurbo de Kubo. Mi estas instruisto en meznivela lernejo kaj mi instruas la hispanan lingvon. En ĉi tiu momento mi lernas la superan gramatikan parton de Esperanto. Jam mi finis la trian nivelon. Mi estas lernanta daŭre. Ni kaj la kuba junularo preparas la Universalan Kongreson de UEA, kiu okazos en nia lando en 1990. Unue, mi bezonas, ke vi klarigu al ni pri la uzo de la sufiksoj *-ig-* kaj *-iĝ-*. Mi havas dubon pri tio. ..

Spertiĝu pri *-iĝ-*!

Reage al la supra letero, ni aperigas tripartan artikolon. Ĉi tie ni esploras la uzon de la tre utila sufikso *-iĝ-*, en la venonta numero de *Juna amiko* ni studos la uzon de ĝia frato *-ig-*. En la lasta numero de la jaro, ni studos kaj ekzercos la uzadon de ili ambaŭ.

Ĝenerala regulo: IĜ signas ŝanĝon de stato. Io ne estis, sed nun ekestas.

Plej ofte, ni uzas *-iĝ-* por krei verbojn. Verbo, kiun ni kreas per *-iĝ-* ĉiam estas netransitiva aŭ unu-liga. Tio estas, ĝi havas subjekton, sed ne havas objekton. Ni donas kelkajn ekzemplojn de la du bazaj kategorioj de verboj por helpi vin kompreni tion:

Netransitivaj (unuligaj) verboj
(subjekto + verbo)

Mi staras.
Mia amiko proksimiĝas.
Ni soifas.
Ni eniras.
Li alvenas.
La akvo bolas.
Ni ĝojas.
Ni malsoifiĝos.

Transitivaj (duligaj) verboj
(subjekto, verbo + objekto kun *-n*)

Mi legas libron.
Li salutas min.
Ni vidas trinkejon.
Ni vokas kelneron.
Ni mendas teon.
La kelnero alportas du tasojn.
Li verŝas la teon.
Ni trinkas la teon.

- Ni povas uzi *-iĝ-* por formi netransitivan verbon el adjektivo. Ekzemple:
La vetero estis malbona, sed ĝi nun estas bona. Ĝi boniĝis.

Ekzerco: Kompletigu la sekvajn frazojn simile:

1. Mia aŭto estas malrapida. Post modifo ĝi estos rapida. Ĝi _____.
2. Joĉjo estas malforta. Se li manĝos multan spinacon, li _____.
3. Somere la folioj estas verdaj. Aŭtune flavaj. Ili _____.
4. Antaŭe li estis kruela. Nun li estas afabla. Li _____.
5. La bruna esploristo vidas leonon. Lia vizaĝo _____.
6. 6.00atm: 5°C. 11.00atm: 20°C. La temperaturo _____.
7. Ekpluvis dum la ekskurso. Tiuj sen ombreloj kaj paltoj _____.
8. La urbo estis malgranda. Alvenis novaj loĝantoj. La urbo _____.
9. Ŝi estis trankvila. Nun ŝi krias histerie. Ŝi _____.

● Ni povas uzi *-iĝ-* por krei netransitivajn verbojn el substantivoj. Ekz.: Li ekektis soldato. Li soldatiĝis. Foje tio okazas metafore, ekz.: Ŝi statuiĝis. T.e. ŝi iĝis senmova kiel statuo. Nur tiu, kiun tuŝis la Reĝo Midas, povas vere statuiĝi!

● Ni povas uzi *-iĝ-* por krei netransitivajn verbojn el prepozicioj. Ekz.: Ili estis apartaj. Sed ne plu. Ili kuniĝis.

● Ni povas uzi *-iĝ-* por krei netransitivajn verbojn el substantivo kaj prepozicio. Ekz.: La pasaĝeroj eniris en la buson. Ili enbusiĝis.

Feliĉiĝu! Ni ne donas duan ekzercon. Anstataŭe li prezentas rakonton, kiu donas multajn ekzemplojn de la tri supraj uzoj de *-iĝ-*.

LA VERA AMO

Joĉjo loĝas en Naskurbo. Li estas deksep-jara junulo. Unu tagon, dum danco en la urbeto halo, li renkontas Anan. Ŝi estas belega junulino. Ili rigardas en la okulojn unu de la alia. Ili tuj enamiĝas. Dum la posta jaro ili estas tre feliĉaj. Sed sekvas katastrofo. Joĉjo dekok-jariĝis kaj devis eniri la armeon. Li devis soldatiĝi en fora urbo.

La du amantoj adiaŭis ĉe la stacidomo. "Mi ne volas disiĝi de vi" ploris Ana.

”Estu pacienca,” diris Joĉjo: ”post du jaroj ni rekuniĝos, ni fianĉiĝos kaj poste geedziĝos.” Ili kunpremiĝis unu al la alia, interbrakiĝis por unu lasta kiso kaj post tio Joĉjo envagoniĝis. Ana ploris dum la trajno elstacidomiĝis kaj malaperis.

En la postaj monatoj Ana estis tre malgaja. Ŝi enprofundiĝis en siajn pensojn. Ŝi senpacienĉiĝis kaj senesperigiĝis. ”Soldatoj estas popularaj,” ŝi pensis: ”Knabinoj facile enamiĝas pro la uniformo. En Batalurbo estas multaj belaj knabinoj. Ĉu mi anstataŭiĝos per unu el ili? Ĉu lia amo forvaporigiĝos?” Ana finis la lernejon sukcese kaj pensis: ”Ĉu mi studentigu?” Sed la universitato estas en la ĉefurbo — eĉ pli for de Joĉjo. Ŝi vidis reklamon en ĵurnalo. Oni volis sekretarion en Batalurbo. ”Ĉu mi iru? Kiel mi decidu? Ha, jes, mi ĵetu moneron. La sorto decidu! Se ĝi alteriĝos kape mi iros, se dorse, mi ne restos.” La monero enaeriĝis, alteriĝis, kaj... jen la decido: ”Nun mi seniĝos de mia malĝojo! Mi kandidatiĝos!” Oni akceptis ŝin, kaj ŝi baldaŭ translokiĝis kaj enposteniĝis. Ŝi ne informis Joĉjon, ke ŝi sekretariĝis en lia urbo: ”Mi surprizos lin!”

La armea bazo situis dek kilometrojn for de Batalurbo. Soldatoj ne rajtas ricevi vizitantojn — nur familiaĵojn. Kial ili ne tuj geedziĝis? Ana ne povos iri al la bazo laŭ la vojo — oni kontrolas tion. Frenza ideo enkapiĝis ĉe ŝi! Apud la bazo fluas rivero. Jen sekreta vojo.

Ŝi iris vespere al la rivero, senvestiĝis kaj enakviĝis. ”Mi devas sekvi la riveron, ĝis ĝi disbranĉiĝos.” ŝi pensis. Ŝi atingis la bazon; jen gardo-turoj kaj barilego. Noktiĝis. Serĉlumo subite enŝaltiĝis. Ana enspiris kaj plongiĝis

suben. Kiam ŝi alsurfaciĝis la lumo jam foriĝis. Do, ŝi albordiĝis, sed tuj enkotiĝis. Ŝi investiĝis rapide kaj atingis la barilon. Per tranĉilo ŝi ektranĉis la dratojn de la barilo. Subite, ŝi rimarkis gardiston apude. Ŝi preskaŭ svenis pro timo. Dum momento ŝi senkonsciĝis. Ŝi senmoviĝis — eĉ statuiĝis. La gardisto forpaŝis. Ana tranĉis plu kaj baldaŭ sukcesis tratruigi. Ŝi fine trovis la barakon de Joĉjo, ĝi estis malplena — ĝi jam senhomiĝis matene. Ŝi rigardis la litojn. Ŝi trovis tiun kun lia nomŝildo. Ŝi kisis la ŝildon fervore kaj decidis kaŝi sin. Ĉu ŝi enŝrankiĝu, sublitiĝu, kontraŭmuriĝu aŭ interkurteniĝu?” Ŝi sublitiĝis kaj atendis.



Post horo la soldatoj revenis brue, eluniformiĝis kaj enlitiĝis. Tuj kiam la barako senlumiĝis kaj la soldatoj endormiĝis, Ana elvenis kaj surgenuiĝis apud la kuŝanta formo en la lito kaj flustris: "Joĉjo, mia kara, vera amo!" kaj kisis lin.

Iliaj lipoj intertuŝiĝis. Iliaj buŝoj kunpremiĝis.

"Kio!!! Kio okazas?!!!" kriis la soldato: "Ĉu mi perfortiĝas?"

"Aaaaaah!" kriis Ana: "Vi ne estas Joĉjo! Kiu vi estas?"

"Soldato Peĉjo! Mi ekde hodiaŭ dormas ĉi tie. Ĉu vi estas Ana?"

"Jes. Kiel vi scias tion?"

"Nu, Joĉjo multe parolis pri vi. Li tre amas vin. Kaj ĉio, kion li rakontis pri viaj kisoj, estas vera."

"Kie estas mia kara Joĉjo?"

"Ho, ve! Via kara Joĉjo forkuris. Li eskapis de ĉi tiu bazo hieraŭ por reiri al Naskurbo por retrovi vin kaj edziĝi kun vi!"

● Ni uzas *-iĝ-* por transformi transitivan verbon al netransitiva.

Ekzemple: La butikisto fermas la butikon je la sesa.

Je la sesa, la butikisto fermiĝas .

Ekzerco: Kompletigu la frazojn per -iĝ-verboj:

1. Mi vidas la ŝipon sur la horizonto. La ŝipo _____.
2. La pordisto perdis la ŝlosilon. La ŝlosilo _____.
3. La atakanto vundis la soldaton. Li _____.
4. La instruisto finas la lecionon. La leciono _____.
5. La instrukcioj konfuzas la leganton. Ŝi _____.
6. Mi rompis tri tasojn. Prefere, mi diru, ke ili _____.
7. La prezidanto komencis la kunvenon. Je la oka ĝi _____.
8. Ĉu vi povos solvi la problemon? Ĉu ĝi estas morgaŭ ĝi _____.
9. La laŭta vekhorloĝo vekis la profesoron. Li tuj _____.

● Ni kelkfoje uzas *-iĝ-* kun netransitivaj verboj. Tiukaze, ĝi portas la signifon *ek*. Ĝi indikas moviĝon survoje al senmova stato:

Ekz: Ni sidis. Kiam la profesoro alvenis, ni stariĝis. Nun ni staras.

Ekzerco: Legu la rakonton. Poste relegu ĝin aldonante la -iĝ-verbojn.

La kato envenis kaj _____ apud la fajro. Ĝi kuŝas tie la tutan matenon. Panjo envenis kaj _____ en fotelo. Ŝi sidas tie dum horo. Silvia envenis kaj _____ apud la kato. Ankoraŭ nun ŝi genuas apud ĝi kaj karesas ĝin. Paĉjo malfermas lad-saktolon en la kuirejo. La kato aŭdas tion, tuj _____ kaj kuras en la kuirejon. Ve, Paĉjo malfermis skatolon da aŭto-oleo. La kato iĝis tre indigna. Panjo iĝis kolera, ĉar Paĉjo ne rajtas malfermi skatolojn da aŭto-oleo en la kuirejo.

● La verbo 'interesiĝi' bezonas ekstran studon. Ĝi povas veni de la adjektivo 'interesa'. Ekz.: La unua parto de la filmo estis teda, sed la dua parto estis interesa: meze, la filmo *interesiĝis*. Ĝi povas veni de la transitiva verbo 'interesi' kaj havi momentan aŭ longdaŭran signifon. Ekzemplo de la momenta signifo: La filmo *interesis* min. Mi *interesiĝis* pri ĝi. La longdaŭra uzo ne rilatas al momenta ŝanĝiĝo, sed al kutimo, emo, ŝato, hobbio: Ekzemple: Mi *interesiĝas* pri trajnoj. Mi unue *interesiĝis* pri ili, kiam mi estis du-jaraĝa, kaj mi ankoraŭ nun *interesiĝas* pri ili eĉ pli.

Ekzerco: parigu la frazpartojn:



Ornitologo <i>interesiĝas</i> pri ...	kavern-esplorado
Filatelisto <i>interesiĝas</i> pri ...	tertremoj
Numismato <i>interesiĝas</i> pri ...	arboj
Astronomo <i>interesiĝas</i> pri ...	infan-malsanoj
Kaligrafo <i>interesiĝas</i> pri ...	instruado
Speleologo <i>interesiĝas</i> pri ...	vetero
Meteologo <i>okupiĝas</i> pri ...	poŝtmarkoj
Oftalmologo <i>okupiĝas</i> pri ...	moneroj
Pediatro <i>okupiĝas</i> pri ...	okul-malsanoj
Pedagogo <i>okupiĝas</i> pri ...	birdoj
Forstisto <i>okupiĝas</i> pri ...	steloj
Sismologo <i>okupiĝas</i> pri ...	skribado

Pli da ekzercoj pri -iĝ- estas troveblaj kun la teatraĵeto 'La psikologo sukcesas' en la libro *Tridek rotuloj*, kaj en la iam aperonta libro *Najbaroj kaj borjoj* kune kun la teatraĵo 'Najbaroj'. Ambaŭ libroj verkitaj de la redaktoro de *Juna amiko*.

Instruistoj kaj gramatikistoj estas petataj komenti la utilecon aŭ validecon de ĉi tiu prezentaĵo kaj ĝiaj ekzemploj. Ĝi formas la bazon de gravaj ĉapitroj en eterne verkata internacia lernolibro. Dankojn mi jam esprimas al s-ro Claude Gacond, direktoro de la Kultura Centro Esperantista, por siaj ideoj kaj teorio pri la temo.

La trompita urso

Vivis iam vulpino ruza kiel ĉiuj vulpinoj. Tutan nokton ŝi vagadis serĉante manĝaĵon sed vane. Tagiĝis, kaj la vulpino kuŝiĝis sub vojrandan tufon pripensante kiel trovi ion manĝi. Tia, kuŝante, la muzelo sur la antaŭaj piedoj, ŝi flaris fiŝodoron. Tiam ŝi levis sian kapon kaj rigardante valen, laŭ la vojo, ŝi ekvidis bovĉaron. "Nu, bone!" pensis la vulpino: "Jen mia manĝaĵo. Ŝi tuj eliris elsub la tufo kaj kuŝiĝis sur la vojon, kvazaŭ ŝi estus morta. La ĉaro alproksimiĝis kaj la kamparano, vidinte la vulpinon, kriis al la bovoj: "Halt! Halt!"



Kaj tuj ili haltis. La kamparano aliris la vulpinon, rigardis ŝin de proksime kaj, vidinte, ke tiu ne spiras, ekdiris: "Ho! Diable! Mortis tiu vulpino ĝuste tie ĉi! Ho, kian belan veŝton mi faros el ŝia felo por mia edzino. Tion dirinte, li prenis la vulpinon kaj trenis ŝin al la ĉaro, en kiun li ĵetis ŝin, sur la fiŝaron. Poste, li kriis: "Ek!" kaj la ĉaro ekmoviĝis. Iranta preter la bovoj, la kamparano admonis ilin hasti por pli rapide alveni hejmen kaj senfeligi la vulpinon. Sed, post kiam la bovoj ekmoviĝis, la vulpino ekpuŝis perpiede la fiŝojn el la ĉaro. La kamparano gardis la bovojn, la ĉaro grincis kaj la fiŝoj el la ĉaro falis. Post kiam la vulpino enĉarigis aron da fiŝoj sur la vojon, ankaŭ ŝi, atentege, elĉarigis kaj haste ekkolektis la fiŝojn de sur la vojo. Kolektinte ĉiujn, ŝi transportis ilin al sia hejmo kaj ekmanĝis ilin pro sia granda malsato. Ĝuste post

ekmanĝo, jen urso vizitis ŝin: "Bonan apetiton, Vulnjo! Ho, kiom da fiŝoj vi havas! Nu, donu ankaŭ al mi, ĉar mi ege malsatas."

"Nu, vi preterlasu vian apetiton, Urĉjo, ĉar ne por via apetito laboris mi. Se tiom malsategas vi, aliru laĝeton kaj enigu vian voston en la akvon, kiel mi faris, kaj vi havs fiŝojn manĝi."

"Ve! Instruu min, kara Vulnjo, ĉar mi tute ne scias, kiel kapti fiŝojn."

La vulpino, ironie ridanta, respondis: "Ho, urĉjo, ĉu vi ne scias, ke la bezono irigas nin sur nekonataj vojoj kaj lernigas al ni nepripensitajn aferojn? Nu, aŭskultu. Ĉu vi ŝatas manĝi fiŝojn? Iru al la apuda arbara laĝeto, enigu vian voston en la akvon kaj senmove atendu ĝismatene kaj tiam fortege eltiru vian voston el la akvo kaj amason da fiŝoj vi eligos, eble duoble aŭ trioble ol mi."

Neonion dirinte, la urso alkuris la apudabaran laĝeton kaj enigis sian tutan voston en la akvon.

Ĝuste tiun nokton ekblovis malvarmega vento glaciiganta la enbuŝan langon kaj eĉ la subfajran cindron. Glaciigis ankaŭ la akvo de la laĝeto, kaptante la voston de la urso kvazaŭ per forta tenaĵo. Pro doloro kaj malvarmo, la urso ne sindetenis kaj fortege eltiris sian voston. Sed, la povra, anstataŭ eligi fiŝon, li restis senvosta. Pro dolorego, li ekgrumblis kaj saltetis, kaj, ĉagrenite, ke la vulpino lin trompis, ekiris mortbati ŝin. Sed la ruza vulpino scipovis singardi. Elirinte sian hejmon, ŝi kaŝis sin en truego de apuda arbo kaj, vidinte la senvostan venantan urson, ŝi kriis al li: "He, Urĉjo, ĉu la fiŝoj formanĝis vian voston aŭ ĉu vi volis ĉiujn fiŝojn kapti el la lago?"

Aŭdinte tiujn mokojn, eĉ pli forte li afliktiĝis kaj rapidis al la arbo, sed la truo estante mallarĝa, li ne sukcesis trairi ĝin. Do, li prenis hok-branĉon kaj ekserĉis en la arbo-truo, por elirigi la vulpinon kaj punbati ŝin. Sed, kiam li kaptis ŝian piedon, ŝi kriis: "Tiru, stultulo, ĉar vi tiras branĉon!" Kaj poste, kiam la urso kaptis branĉon, ŝi kriegis: "Ve, Urĉjo, ne tiru, ĉar vi forrompos mian piedon!"

Vane la urso provis elirigi la vulpinon el la arbo-truo; li tute ne sukcesis. Kaj tiel, la urso, trompita de la vulpo, restis senvosta.

VORT-KLARIGOJ

ruza: lerta, kapabla trompi.
vagi: piediri divers-direkte.
tufo: densa aro da herboj.
muzelo: besta buŝo.
flari: sensi per la nazo.
felo: la haŭto kaj haroj de besto.
senfeligi: forpreni la felon de besto.
grinci: eligi akran sonon pro kunfroto de malmolaj objektoj, ekz. la metalo kaj ligno de la aksoj de la ĉaro.
apetito: manĝemo.
tenaĵo: pinĉilo.
sindeteni: rezigni.
afliktiĝi: ĝeniĝi, senti embarason kaj kole-
ron.
hoko: kurba instrumento uzata por kapti
ion.
alkroĉi: ligi. •

*Etrumanigis
Ionel One t*



Gvidas: Josef Chvosta, Leninova 16, CS-29001 Podebrady, Ĉeĥoslovakio.

Mia libroŝranko

En mia libroŝranko troviĝas multaj Esperantaj libroj. Sur la unua breto estas pluraj Jarlibroj de UEA kaj SAT, katalogoj kaj binditaj gazetoj. Ekzemple, tie estas jenaj jarkolektoj: *Espero katolika*, organo de SAT; *Dia regno*, organo de budhanoj; *El popola Ĉinio*, gazeto pri Bulgario; *Juna amiko*, gazeto de fervojistoj; *Monato*, du-semajna gazeto.

Sur la dua breto estas tradukoj: *Faraono* de H. Sienkiewicz, tradukita de A. Grabowski, *D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde* de H.G. Wells, *Koko krias jam* de K. Kalocsay kaj *Don Kihoto en Barcelona* de Tirso de Molina.

Sur la tria breto estas la sekvaj broŝuroj: *Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong* el Japanio, *Infanoj en Hiroŝimo* el Aŭstralio, *60 jaroj de USSR* el Francio kaj *Perkanto al Esperanto* redaktita de Tomaszewski el Hispanio.

Sur la kvara breto estas prospektoj en Esperanto pri kelkaj ĉefurboj: Varsovio (Italio), Parizo (Hispanio), Moskvo (Svedio), Bern (Belgio), Vieno (Norvegio), Istambul (Rumanio), Tokio (Britio), Lisbono (Francio) kaj Vaŝingtono (Hinda Unio).

Fine estas lernolibroj kaj vortaroj: mi elektas *Manuale di Esperanto* (franca), *Diccionari Esperanto – Katala* (kroata), *L-ewwel kors ft-Esperanto* (suum), *Esperanto in een nootdop* (germana) kaj *Esperanto za sole, tecaje in samouke* (ĉeĥa).

La rakontado de Karolo estas ŝajne tre serioza. Tamen evidentas, ke li aŭ volas petoli, aŭ simple eraras. Ĉu vi povas trovi la erarojn? Skribu vian opinion al la supra adreso. Ĉiuj respondoj estos premiitaj.

Ĝustaj respondintoj al antaŭaj taskoj estas Kiss János, Nagy Péter, Kocsis Mária, Orosz Adrien (H), Arunas Karaliunas, Oleg Pisarenko, Henrika Marcinkénaitė, Rasa Zurbaitė, Ramune Galdikaite, Regina Jukeliénė, M. Jemeljanova, Igor Cicurskij (SU), Jana Vosátková, Vera Kohoutová (CS), Kerstin Bucholski, Frauke Kuse (GDR), kaj Zoran Cirič (YU). La rubrikestro kaj la redaktoro dankas vian reagon!

REZULTOJ DE LA ILEI-ENKETO:

KIE NI LERNAS TRA LA MONDO

En numero 1988/3 de *Juna amiko* ni aperigis demandilon por trovi, kie en la mondo oni instruas Esperanton en elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Ni aperigas ĉi tie la rezultojn, kiuj atingis nin pri 52 klasoj en 17 landoj. Tiuj rezultoj estas certe tre malkompletaj (nur en Hungario ni havas multe pli da klasoj ol tio). Sed ni esperas, ke ĝi estos komenco. Venontjare, ni ne komencos de nulo, kaj post kelkaj jaroj ni esperas havi pli kompletan superrigardon, kun la helpo de ILEI-sekciestroj kaj Landaj Asocioj.

Ni bedaŭras, ke ni ne povis pli frue aperigi la rezultojn en *Juna amiko*, ĉar ni volis doni al vi la eblecon uzi la liston por starigi interklasan korespondadon kaj kontakton — tamen eble ne tro malfruas.

Pro spaco-manko ni devas doni la rezultojn per etaj literoj kaj en koda formo. Jen la vicordo de la informoj: Lando; Urbo; Lerneja nomo; Lerneja adreso; Nomo de instruisto (familia nomo majuskle); profesia?; dungita?; Nombro de lernantoj; Aĝo de lernantoj; oficialeco; Daŭro de kurso; Studhoroj entute; studhoroj semajne; Uzata lernolibro; Ekzameno; Cetero.

Aŭstrio

Laŭ la sekciestro de ILEI, ne okazis lerneja instruado en 1988/89.

Belgio

Antverpeno: Stedelijk Leergangen voor Talen (Oficialaj urbaj lingo-kursoj); Quelenstr. 31B, B-2000 Antwerpen; STAES, André; jes; jes; 10; ekde 24-jaraj; oficiala 3-jara kurso; sept. 88 — jun. 89; 150 horoj; 5 h/sem.; 'Tra la labirinto de la gramatiko' (Faulhaber); oficiala ekzameno.

Charleroi: Ecole Bosquetville; DESTABELLE, Roger kaj DELFORGE, Marcel, 16 rue des Glaciers, B-6001 Charleroi; ne; ne; 10; ekde 40-jaraj; hobia; sept.88 — jun. 89; 40 horoj; 2 h/sem.; 'Initiation Theorique et Pratique (Denoe); sen ekzameno.

Leuven; Parideaens; Damiaanplein 9, B-3000 Leuven; RAEYNAEKERS, Joris; jes; jes; 5; 14-jaraj; hobia, nedeviga; okt.88 — jun.89; 30 horoj; 1 h/sem.; 'Gerda malape-

ris' (Piron); sen ekzameno; La lernantoj deziras korespondi tutmonde.

Welkenraedt: Urba kulturcentro; GRELA, Marie kaj Willy, rue de la Colline 16, B-4840 Welkenraedt; jes; ne; 6; 11—50-jaraj; 3-jara kurso; 100 horoj jare; 90 min./sem.; 'Junulkurso' (SAT); 'Nouveau cours rationnel d'Espéranto' (SAT-amikaro), 'Nouveau cours d'Espéranto' (Ludwig-Triolle); sen ekzameno; En 1988 ili organizis unusemajnan staĝon kun helpo de afrikanoj subvenciataj de Unesko; ili ripetos tion en 1989.

Britio

Chippenham; Sheldon School; JONES, Malcolm, 41 Causeway, Chippenham, SN15 3DD, Wiltshire; jes; jes; 6; 12—15-jaraj; hobia; sept.88 — ; 30 min./sem.; 'Jen nia mondo' (Wells), 'Juna amiko' k.a.; sen ekzamenoj.

Horsham; Forest Community School; FEATHERSTONE, David, 121 Limpsfield

Rd, S. Croydon, CR2 9LF; jes; jes; 8; 16—74-jaroj; oficiala; okt.88 — apr.89; 40 horoj; 2 h./sem.; 'Teach yourself Esperanto' (Wells); Ekzameno de EAB proponata; La sama instruisto gvidos nedevigan kurson en Londono prepare al la nova ŝtata ekzameno GCSE (Generala Atestilo de Mezgrada Edukado) laŭ kiu Esperanto estas ekzamenobjekto.

Penrith; Ullswater High School; THOMPSON, Stephen, Garth View, Bolton, Appleby-in-Westmorland, Cumbria, CA16 6AL; jes; jes; 5; 13-jaraj; hobia; sept.87 — ; 3-jara kurso; 1 h./sem.; 'Practical Course in Esperanto' (Szilagyí); oficiala ekzameno eblas; La instruisto ne promesas respondi al individuaj leteroj aŭ korespondpetoj.

Salford; Salford College of Technology, Frederick Rd, Salford, M6 6PU; GUBBINS, Paul; jes; jes; 8; 18—20-jaraj; hobia; sept.88 — ; 2-jara kurso; 30 horoj jare; 1 h./sem.; Artikoloj el 'Monato'.

Winscombe; Sidcot School, CURTIS, David, 7 St. Jude's Tce, Weston-super-Mare, BS22 8HB; jes; jes; unu (sed dek venontjare); 18-jara; oficiala; sep.88 — jul.89; 90 horoj; 3h./sem.; cele al la nova GCSE-ekzameno.

York; York Sixth Form College, Tadcaster Rd., York, Nth. Yorkshire; IBBOTSON, John; jes; ne; 7; 16-jaraj; oficiala; sept.88 — jun.89; 1-jara; 80 horoj; 2 h./sem.; propran materialon; ŝtata GCSE-ekzameno.

Bulgario

Gabrovo; Elementa lernejo 'Janko Kolvev'; KANCEVA, Nadejda Ivanova, str. Alexo Bogoridi 1, BG-5300 Gabrovo; jes; jes; 25; 6—8-jaraj; nedeviga; okt.88 — jun.89; 66 horoj; 2h./sem.; ekzercaro de Neno Janev; sen ekzameno.

Ĉeĥoslovakio

Budišov; 'Junes' DPM, N.B. 690, CS-747-87 Budišov; DOHNAL Karel; ne; ne; 9; 11—19-jaraj; nedeviga; okt.88 — jun.89; 50-80 horoj; 1-2 h./sem.; 'ABC-lernolibro'; sen ekzameno.

Námestovo; Pionirdomo, str. Fučíkova 121, CS-029-01 Námestovo; DVORAKOVA, Anna; ne; jes; 13; 10—32-jaraj; nedeviga;

okt88—jun89; 66 horoj; 2 h./sem.; rekta metodo sen lernolibro; sen ekzameno.

Pardubice; Sindikatejo de uzino TESLA; RYZNAKOVA, Jarmila, Na Okrouhliku 953, CS-530-03 Pardubice; ne; ne; 10; 12—16-jaraj; hobia; okt.-junio ĉiujare, kelkaj studentoj jam 6 jarojn sekvas la kurso; 70 horoj/jare; 2 h./sem.; Lernolibro de L. Prachar, nova slovakia internacia lernolibro 'Esperanto Esperante', 'Domilingo'; neoficiala ekzameno kun diplomoj; Kursoj por plenkreskuloj okazas ankaŭ en TESLA.

Poprad; Int. Kultura kaj Kleriga Centro de SEA, Sobotské nám 6, CS-058-01 Poprad; RYBIN, Milos kaj ZACHARIAS, Anton; ne; jes; 30 en du grupoj; plenkreskuloj; hobia; sept.88 — feb.89; 120 horoj; 6 h./sem.; rekta metodo; SEA-ekzameno; samloke trinivela intensa somera kurso komence de julio por 120 plenkreskuloj; 13-taga kun 50 horoj.

Zilina; Stredna Priemyselna Skola Stavebna, tr. Obrancov Mierv 25/5, CS-010 01 Zilina; FEIFICOVA, Magda; ne; ne; 7; 16—18-jaraj; hobia; okt.88 — jun.89; 2 h./sem.; rekta metodo; neoficiala ekzameno.

Ĉinio

Tonghua; Tonghua-a Normala Instituto, 156 Toudaogoulu, Tonghua, Jilin-provinco; YU, Dequan; jes; jes; 269; 20—22-jaraj; nedeviga; mar.88 — jun.89; 92 horoj; 2 h./sem.; 'Lernolibro de Esperanto' kaj 'Esperanto-kurso por memlernado'; oficiala ekzameno.

Finnlando

Tampere; Lentavanniemen ala-aste; HAMALAINEN, Sylvia, Teivaalantie 85, SF-33400 Tampere; jes; jes; 4; 12-jaraj; hobia; aug.88 — maj.89; 35 horoj; 1 h./sem.; 'Tom kaj Tina'; sen ekzameno.

Francio

Besancon; Esperanto-Asocio, 92 rue des Granges, F-25000 Besancon; s-ro COULON, s-ino POUX; jes-ne; ne-ne; 7; ekde 20-jaraj; hobia; okt.88 — jul.89; 60 horoj; 2 h./sem.; 'Karlo' (Privat), 'Metodo 11' (UFE); sen ekzameno.

Noyant, Ecole Primaire Publique, CES, F-49490 Noyant; NAULET Paulette; jes; ne; 37; 9—13-jaraj en du grupoj; hobia; okt.88 — jun.89; 1 h./sem.; 'Junulkurso' (SAT); oficiala unuagrada ekzameno.

Vierzon, Chemin des Erables, F-18100 Vierzon; CAHOUE, Raoulo; ne; ne; 10; 45—65-jaraj; hobia; sep.88 — jun.89; 1 h./sem.; oficiala ekzameno.

Villefranche-sur-Saone: ni supozas kaj esperas, ke la kvar klasoj kaj 120 studentoj oficiale funkciintaj dum pluraj jaroj ĝis 1988, daŭras en 1989. Vidu detalojn en 'Juna amiko' 1988/2, p.23.

Germana DR

Schwerin, Popola Altlernejo, Volkshochschule 'Elm Welk', Steinstr. 23, DDR-2754 Schwerin; GERARD Ingrid; ne; jes; 32; 18—65-jaraj; hobia; mar.88 — jun.88 kaj okt.88 — feb.89; 30 horoj; po 2h./sem por du niveloj; Lernolibro de Dahlenburg kaj Liebig; sen ekzameno.

Hungario:

Vidu la apudan tabelon. La sumo de 2551 lernantoj komparas kun 3286 en la antaŭa jaro. La plena statistiko estas 15-paĝa kaj distingas kvin kategoriojn de klasoj (du oficialaj, tri ne) kaj donas disdividon laŭ la 19 provincoj. Oni akiras tiujn statistikajn informojn ĉiujare en septembro.

Italio

Livorno, Lernejo 'Carlo Collodi', via di Salviano 87; NERI, Lami Lidia, via A. Grams-

ci 92, I-57125 Livorno; jes; jes; 19; 8-jaraj; oficiala kaj deviga; okt.88 — maj.89; 60 horoj; 2 h./sem.; Domiling, 'Juna amiko'; sen ekzameno.

Massa, Lernejoj Vilette A, Vilette B kaj Infaneta Lernejo (5 klasoj); BERTOZZI, De Angeli Jonne, S-ino, Via Quercioli 114, I-54100 Massa; jes; estis; 14+15+12+20+30; 7—9-jaraj, la lasta 3—5-jaraj; oficiala, deviga; okt.88 — jun.89; 85,90,85,90 kaj 30 horoj resp.; 3,4,3,4 kaj 1 h./sem. resp.; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi), kajeroj, 'Juna amiko'; oficialaj ekzamenoj en 4 el la klasoj.

Luksemburgo

Esch/Alzette, Elementa lernejo Brill; PARINI, Pierre; jes; ne; 7; plenkreskuloj; hobia; okt.88 — maj.89; 45 horoj; 90 min./sem.; 'Tachenlehrbuch Esperanto' (Leipzig); sen ekzameno.

Nederlando

Heemskerck, 'Sint Joseph', Postbus 78, NL-1960 AB Heemskerck; VERWOERD, A.J.; jes; jes; 19 infanoj kaj 4 instruistoj; 10—12-jaraj; hobia; sep.88 — jul.89; 30 horoj; 45 min./sem.; 'Sub la verda standardo' (Korté); sen ekzameno.

Pollando

Tychy, Szkoła Podstawowa (Elementa lernejo) n-ro 40, ul. Zgrzebnicka 45; MA-MOK Krystyna; jes; ne; 53 en 3 grupoj; a11—13-jaraj; hobia; okt.88 — jun.89; 60 horoj por ĉiu grupo; 2 h./sem.; 'Esperan-

RESUMO DE INSTRUADO EN HUNGARIO 1988/89

Nivelo	Oficialaj Kursoj	Kursoj entute	Oficialaj lernantoj	Lernantoj entute
Elementa (6—10-jaraj):	6	32	199	475
Elementa (10—14-jaraj):	13	66	234	861
Mezlernejo (14—18-jaraj):	4	17	82	187
Universitatoj, k.s.:	4	8	80	102
Plenskreska edukado:	—	33	—	361
Korespondaj/intensaj kursoj:	—	—	—	565
Sume	27	156	595	2551

to'(Pettyn); oficiala ekzameno; volas korespondi tutmonde kaj ricevi revuojn, insiĝojn ktp. por ekspozicio.

Varsovio, Internacia Kulturdomo pri Danco; JANKOVSKA Teresa, ul. Iwicka 40 m. 18, PL-00-735 Warszawa; ne; jes; 46 en du grupoj; 6-8- kaj 8-12-jaraj; deviga por tiuj, kiuj volas eniri la ensemblon; okt.88 - jun.89; 72 hroj; 2 h./sem. por ĉiu grupo; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi), 'Juna amiko', 'Skolta mondo'; sen ekzameno.

Wasilków, Szkoła Podstawowa n-ro 2, ul. Polina 1A, PL-16-010 Wasilków, BARSZCZEWSKA Grazyna; jes; jes; 73 en 3 klasoj; 13-jaraj; oficiala kaj deviga; 2-jara kurso ekde sep.88; 70 hroj jare; 2 h.sem.; 'Esperanto dla karzdego' (Biedulski); sen ekzameno. Krome funkcias du rondoj, unu por dek du 10-11-jaruloj, alia por 5 14-jaruloj, kiuj estas devigaj por tiuj, kiuj elektas ilin, 1 h./sem.; sen ekzameno, uzas 'Juna amiko', 'ICEM-bulteno'.

Portugaliao

Lisbono, PEA, Rua Damaseeno Montivio, 21-B, P-1100 Lisboa; SANTOS Joao; n; ne; 15 en tri grupoj; 13-70-jaraj; hobia; okt.88 - maj.89; 52 hroj; 90 min./sem.; 'Nova amiko inter ni', 'Faktoj kaj fantazioj' (Boulton), 'Paŝoj al plena posedo' (Auld); neoficiala ekzameno; Oni deziras oferti internacian ekzamenon en Portugaliao, precipe por instruistoj - kiam pretos la UEA/ILEI-ekzamena libreto, tio eblos.

Sovet-unio

Baku, Urba mezlernejo n-ro 160, MIRZOJEV Akif, ul. Aga-Nejmatulla 22, kv. 23, SU-370145 Baku; ne; ne; 7; 14-jaraj; hobia; unujara kurso ekde jan.88; 50 hroj; 1 h./sem.; 'Lernolibro de Esperanto' (Semjonova, Isajev); neoficiala ekzameno.

Barnaulo, Lernejo 102, MAKOVJEJ, Nikolao, E-grupo, Ab. jaŝ 2040, SU-656064 Barnaul; ne; ne; 15; 11-14-jaraj; hobia; okt.88 - jun.89; 120 hroj; 4h./sem.; (Semjonova, Isajev); ekzameno.

Jelec, Mezlernejo 22, u. Jelec, Kostenko 49, kv. 32, SU-399740 Jelec; BELINSKAJA

Ludmila Ivanova; ne; ne; 12; 14-16-jaraj; hobia; 1 jaro ekde nov.88; 90 hroj; 2h./sem.; 'Baza legolibro por komencantoj' (Benczik), 'Juna amiko'; neoficiala ekzameno.



Klaipeda, Pionira domo, E-klubo, p.k. 179, Klaipeda, Litovio, SU; JAKŠTIENE Vilija; jes; jes; 16; 11-18-jaraj; hobia; sep.88 - jun.89; 144 hroj; 2 x 2h./sem.; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi); oficiala ekzameno kun diplomo.

Kohtla-Jarve, 1a Mezlernejo, Katse str. 2, SU-202020 Kohtla-Jarve 8; JOUMEEES Leho; jes; ne; 7; 16-jaraj; hobia; nov.87 - maj.90; 90 hroj/jare; 1 ĝis 2 h./sem.; 'Esperanto Keele Opik' (Ojalo); sen ekzameno.

Leningrado, Lernejo 81, pr. Marisa Toreza d. 13, kv. 4, SU-194021 Leningrad; RYBAK Eleonora; jes; ne; 22; 10-13-jaraj plus du instruistoj kaj kvar plenkreskuloj; nedeviga; ekde nov.88; 2 x 2h./sem.; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi); ekzameno.

Moskvo, Amikeca klubo, ŜOROŤHOVA, Nataŝa, p.k. 36, SU-142717 Moskva; jes; jes; 35; ekde 14-jaraj; hobia; sinsekvaj 3-monataj kursoj, ĉiu kun 30 hroj, 2h./sem.; sen ekzameno.

Murmansk, Mezlernejo n-ro 2, pr. Lenina 101-26, SU-183038 Murmansk; MASJUKAS Aleksandras; ne; ne; 10; 15-jaraj; hobia; okt.88 - apr.89; 25 hroj; 1 h./sem.; (Semjonova kaj Isajev), 'Taschenlehrbuch Esperanto' (Dahlenberg), (Makaov, Valev, Satafor - Sofio); sen ekzameno.

Vladimir, Klubo; VALILJEVA Svetlana, ul. Gastelo 4-36, SU-600026 Vladimir; ne; ne; 7; 14-18-jaraj; hobia; 3 monatoj ekde okt.88; 52 hroj; 4 h./sem.; (Seĉgeev; Semjonova kaj Isajev); neoficiala ekzameno.

Svedio

Karlskoga, Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-69124 Karlskoga; FORSMAN Lars; jes; jes; 10 – 15 diversaĝaj studentoj en ĉiu kurso; sinsekvaj ok-semajnaj kursoj; komencantoj en jan. kaj aug. 89, progresantoj mar. kaj okt. 89; intensiva unu-semajna kurso 3a ĝis 7a de julio 1989; 8-semajnaj kursoj havas 200 stud-horojn; oficialaj; sen ekzameno. Kursoj malfermaj al svedoj kaj eksterlandanoj; surloka loĝigo kaj manĝado proponata.

Svislando

Le Locle, Ecole Secondaire du Locle, Rue de l'Hotel-de-Ville 5, CH-2400 Le Locle; GROSJEAN-ROBERT, Mireille; jes; jes; nombro ne indikita; 11–14-jaraj; elektebla el inter 35 kursoj, deviga post elekto; aug.88 – jun.89; 90 min./sem.; sen ekzameno.



Jen nia resumo. Vi rimarkos, ke signifa kvanto de la kursoj estas fakte por plenkreskuloj, kaj la plimulto estas neoficialaj. Se ni ellasos la hungarajn ciferojn momente; ni ricevis raportojn pri ĉ. mil lernantoj, el kiuj 580 estas lernejanoj kaj 420 plenkreskuloj; 350 studas oficiale, 650 hodie. El la 51 kursoj, 29 estas neoficialaj, 22 oficialaj. Certe niaj rezultoj estas tre nekompletaj, estonte ni provos kunlabori pli rekte kun la ILEI-sekcioj en la kompilado de statistikoj, ĉiujare en septembro. Ni apartigos la statistikadon de lerneja kaj plenkreska lernado.

Deziras korespondi

dez. kor. = deziras korespondi
tutm. = tutmonde ĉ.t. = ĉiuj temoj

Ni aperigas korespond-petojn de junuloj, klasoj kaj instruistoj senpage.

Bulgario

Dudek ĝelernantoj el la sepa baza lernejo 'Nikola Vojnovski' dez. kor. tutm. Vidu la foton. La klubo fondiĝis en januaro. Bv. skribi al la gvidantino Stefka Toteva, Interklubo 'Esperanto', 7a Skola 'Nikola Vojnovski', BG-5300 Gabrovo. Tiel vi povos ricevi la hejmajn adresojn de la unuopaj lernantoj.



Ĉeĥoslovakio

Miroslav Bureš, Nadzeliĥkov 487, CS-164-00 Praha-Nebuŝice. Dez. kor. tutm. pri ĉ.t. kaj interŝanĝi bildkartojn.

Dek lernantoj el E-kurso dez. kor. ĉ.t. tutm. Ili estas 10–12-jaraj. Skribu al Vera Gavandová, Nádražni 59, CS-789 91 Stity.

FR Germanio

Katrin Witzler, Wielandstr. 16, D-7944 Herberlingen. 13-jara lernantino dez. kor. tutm., precipe kun Sovet-unio.

Nicole Richter, Wildparkstr. 79, D-7000 Stuttgart 1. 17-jara, dez. kor. Interesiĝas pri biciklado, bestoj (precipe ĉevaloj), legado kaj egipta historio.

Germana DR

René Scholz, Am. Luthersbrunnen 33C, DDR-4600 Wittenberg-Lutherstadt. 18-jara junulo, pri literaturo, scienco, muziko, filmoj.

Hungario

Dudek kvar lernantoj el gimnazio kaj komerca faklernejo en Sarkad, orienta Hungario, dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Preferataj landoj estas Francio, Bulgario, Aŭstrio, Finnlando kaj Meksikio. Por ricevi unuopan adreson laŭ viaj deziroj, aŭ ricevi detalan adresliston, bv. skribi al la instruisto, s-ro Georgo Flender, Ady Endre Gimnazium, Vasut. u. 2, H-5720 Sarkad.

Olasz Erika, Oprendeĵ 2, H-3562 Onga. 16-jara junulino dez. kor. tutm. pri ĉ.t.

Pollando

Anna Lewandowska, Rybniec, PL-86-212 Stolno. 17-jara, vojaĝema, ŝatas naturon, literaturon kaj muzikon.

Tridek tri lernantoj, 10-40-jaraj dez. kor. Jadwiga Rudnicka, II Liceum Ogólnokształcące, str. Turkienicza 22, PL-35-010 Rzeszów.

Margasinska Beata, Zwiastowice 2d, PL-48-258 Twardawa-Opole. 12-jara lernantino dez. kor. Interesiĝas pri turismo, literaturo kaj sporto. Kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn kaj kalendaretojn.

Tomasz Water, ul. Wojska Polskiego 25, PL-63-910 Miejska Górka. 17-jara, dez. kor. kun Hungario. Interesiĝas pri muziko, sporto kaj biologio.

Leszek Sobhowiak, ul. Boczna 7/25, PL-67-400 Wischowa. 16-jara junulo dez. kor. tutm. Interesiĝas pri kemio, tekniko kaj libroj. Kolektas poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj glumarkojn.

Irena Jankovska, ul. Kopernika 11.m.26, PL-96-100 Skierniewice. 13-jara, muziko, geografio, dancado.

Joanna Kletkiewicz, woj. Włocławskie, PL-87-617 Bobrowniki n. Wista. 12-jara ri ĉ.t.

Agnieszka Wisniewska, ul. Budowlanych 8.m.74, PL-87-800 Włocławek. 12-jara junulino pri ĉ.t.

Sebastian Tuszyński, ul. Gagarina 158.m.11, PL-87-100 Torun. 12-jara pri ĉ.t.

Tomasz Ryl, ul. Orbitalna 13/7, PL-67-200 Głogów. 13-jara komencanto, pri ĉ.t.

Krzysztof Reimann, Zodyn 94/8, PL-64-212 Siedlec. 14-jara lernanto dez. kor. kun samaĝaj hungaroj. Nepre respondos.

Cerasi Hubicki, ul. W. Wasilewskiej 14/1, PL-96-100 Skierniewice. 19-jara. Ĉ.t.

Sovet-Unio

Rasa Leonavičiute, Paneriaz 8-13, SU-235000 Jonava, Litovio. 13-jara knabino. Kolektas bildkartojn kaj glumarkojn.

Kersti Prvel, Ravi 3-7, SU-203600 Parnu, Estonio. 15-jara. Historio, retpilko, muziko.

Hardi Hoiemoja, Ehitajate tee 25A-16, SU-200026 Tallinn, Estonio. 14-jara knabo dez. kor. tutm. pri ĉ.t.

Terje Kalamees, Ravi 1-11, SU-203600 Parnu. 14-jara komencantino, kolektas bildojn de bestoj, kalendaretojn kaj bildkartojn. Interesiĝas pri sporto.

Diana Janusevičiute, str. Gelvonu 48-24, SU-232010 Vilnius, Litovio. 12-jara. Dez. kor. tutm. Sporto. Kolektas glumarkojn, bildkartojn, kalendaretojn kaj poŝtmarkojn.

Ramune Galdikaitė, Str. Dukšty 18-76, SU-232010 Vilnius. 16-jara. Lingvoj, kutimoj popolaj, naturo.

Henrika Marcinkenaite, Paberzes 30-21, SU-232010 Vilnius. 13-jara knabino. Dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Kolektas bildkartojn kaj gluetikedojn.

Klubo de 9-12-jaruloj dez. kor. tutm. Du grupanoj estas Andrej Majer (12-j.) kaj Sergej Doronin (10-j.). Esperanto-klub, Jasnovackaja rajona Skola, SU-343020 Oĉeretino, Doneckoj obl.

Loreta Beinoravičiute, V. Karvelio 98-6, SU-235409 Šiauliai, Litovio. 16-jara junulino. Dez. kor. tutm. Ŝatas triki, kuiri, aŭskulti modernan muzikon. Kolektas bildkartojn kaj kalendaretojn.

Turkio

Ruhi Olmez, Pasa Cani sk. Sagir han 40, Mercon-Istanbul.